Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**26-a de aŭgusto 2020, numero 14**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Tago de Eŭropo

22-an de aŭgusto 2020, kadre de nia kara festivalo, okazis la Tago de Eŭropo. Ĝi daŭrigis la tradicion de la aliaj Tagoj, kiuj antaŭe okazis: la Tago de Azio kaj Oceanio (TAO) la 26-an de junio kaj la Mezorienta kaj Nordafrika Tago (MONAT), la 4-an de julio. La sekvan tagon, la 23-an de aŭgusto okazis la Tago de Afriko (vidu ĝian prezenton en ĉi tiu numero de la *Festivala Kuriero*).

La aranĝon, gvidis la Ĝenerala Sekretario de UEA Aleks Kadar.



Aleks Kadar

Bonvenigis nome de la Eŭropa Komisiono de UEA Stefan MacGill. Nome de UEA salutis Fernando Maia Jr.

La muzikan antaŭludon, kiu havis la titolon *Kaj ĉio ĉesis*, plenumis Gijom' Armide, konata Esperanto-muzikisto el Francio. Muzike adiaŭis la partoprenantojn de la Tago koncerto de la legenda Kajto. Krom tio kadre de la muzika programo okazis ankoraŭ kvin programeroj, nomitaj *Muzikaj Interludoj*: Gijom' – *La postrompiĝa temp'*, Francis Soghomonian, Perla Mielo, ĴeLe, LPG.

Dum la Tago okazis multaj tute diversspecaj kaj diverstemaj programeroj, kiel Raportoj pri aktivaĵoj en landoj de Eŭropo, *Eŭropa Landa Parad'* (Stefan MacGill), *Eŭropaj subvencioj* (Francesco Maurelli), *Organizi Lingvo-Festivalon* (Fransoazo Oazo), diversaj video-prezentadoj, babiladoj kaj multo alia. Okazis ankaŭ la Eŭropa Forumo (EDE, EEU, Eŭropa Komisiono de UEA).



Francesco Maurelli

Dum la Solena Fermo la virtualan Tagon de Eŭropo salutis la Estraranoj de UEA kaj membroj de la Eŭropa Komisiono de UEA.

Sekvos la Tago de Ameriko la 30-an de aŭgusto. Ni invitas ĉiujn partopreni. Gastoj el la aliaj regionoj de la mondo estas ege bonvenaj! Pliaj informojn trovu en la Esperanto-SERVEGO de UEA kaj TEJO:
https://eventaservo.org/e/ameriko




Jam tradicie vi povas (re)spekti la tuton ĉe la YuTube-kanalo *UEAviva*:
https://mallonge.net/5z

**Atentu!**
La Tago de Ameriko estis movita al la 30-a de aŭgusto. Detalaj informoj kaj la provizora programo estas ĉe https://eventaservo.org/e/ameriko

# Tago de Afriko



La 23-an de aŭgusto, kadre de la Festivalo kara por ni ĉiuj okazis ankoraŭ unu Esperanta tago – la Tago de Afriko. Ĝi daŭris ĉ. 7 horojn kaj havis riĉegan programon. Vi trovos ankoraŭ multajn informojn pri ĝi en la oficialaj komunikoj de UEA dum la venontaj semajnoj kaj monatoj.

Se vi ne povis partopreni ĉeeste, ne ĉagreniĝu, vi povas spekti ĝin en la kanalo *UEAviva*: https://mallonge.net/5y.

„…Malgraŭ la konstantaj klopodoj ĉu de la antaŭa, ĉu de la nuna Afrika Komisiono revenigi aŭ establi kunlaboran rilaton kun ĉiuj organizaĵoj, nur malmulte el ili akceptis proksimiĝon al la afrika agado de UEA. Lastatempe dank' al la nova teknologio estis starigitaj fejsbuka kaj telegrama forumoj, en kiuj afrikanoj membras pli kaj pli multnombre. Ne ĉiuj afrikaj esperantistoj membras en tiuj listoj, tamen multegaj landoj reprezentiĝas. Io tia donas pli freŝan elanon en la movado, ĉar per tiuj retgrupoj afrikanoj povas interparoli pri ĉio, senkonsidere al kiu ideologia tendenco oni pli inklinas, kaj ĉiuj ŝajnas kompreni nun pli ol antaŭe, ke la problemo ne estas alproksimiĝo al iu aŭ alia ideologia grupo kaj ke diverseco estas faktoro por riĉigi la komunan aferon en nia kara kontinento…"




*Jérémie Sabiyumva, Estrarano de UEA pri AMO kaj Afriko*

„…la kutimaj renkontiĝoj povis okazi virtuale kadre de la Monda Festivalo de UEA. Tiu ĉi portas fokusan rigardon al la regionaj agadoj per aparta programero, nome la Tago de Azio kaj Oceanio, de Mez-Oriento kaj Norda Afriko, de Eŭropo… kaj nun venas la vico de Afriko…"



*Adjévi Adjé, Membro de la Afrika Komisiono pri Bulteno kaj kulturo*

Libreto de la Afrika Tago, kie vi i.a. povas legi ankaŭ la plenajn tekstojn de Jérémie Sabiyumva kaj Adjévi Adjé, estas elŝutebla ĉi tie.




Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# TEĴA bezonas vian helpon

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) ricevis la suban foton el la arkivo. Ĝi similas al iu eltranĉaĵo el iu ĵurnalo aŭ simile. Se iuj el vi scias, kiu estas sur la foto, kiam ĝi estis farita kaj kie, estus granda helpo, se kontaktos la redakcion de la Festivala Kuriero: redakcio@revuoesperanto.org.



Historia foto de TEĴA-kunveno:


Kiu konas kiun?

*Ne fotita dum la ĵus okazinta UK en Adelajdo 1997, sed iam en antaŭa kongreso – sed en kiu? Kiu povas helpi por eltrovi tion kaj indiki, kiuj personoj troviĝas sur ĝi?*

**Koran dankon!**

# Kunsidoj de la Komitato de UEA

Kadre de la Monda Festivalo de Esperanto jam okazis tri Ĝeneralaj Kunvenoj de la Komitato de UEA: la 8-an, la 15-an kaj la 16-an de aŭgusto.



Ili okazis pere de la platfomo Zoom. Partopreni ilin rajtas nur la komitanoj de UEA. Tamen observi rajtas iu ajn. Ĉi-foje por tio oni uzis la videaĵservon YouTube. Vi povas nun (re)spekti registraĵojn de ili en la kanalo *UEAViva*: https://www.youtube.com/user/UEAviva.

La 5-an de septembro okazos daŭrigo de la 3-a Estrarkunsido.

## Estimataj TEJO-membroj kaj abonantoj de Kontakto!

En la retejo de Universala Esperanto-Asocio jam estas elŝutebla la PDF-versio de la revuo *Kontakto*, N 4 (2020).




Por elŝuti la numeron bonvolu viziti la retpaĝon https://uea.org/revuoj (unuafojaj venantoj bezonas registriĝi).

Se vi ankoraŭ ne estas membro de UEA/TEJO, vi povas fari tion, uzante tiun ĉi ligilon – https://uea.org/alighoj.

**Subtenu nian Esperanto-agadon!**

https://www.facebook.com/esperantorevuo

**Sekvu la revuon *Esperanto* kaj la Retan Revuon**

https://twitter.com/revuo_esperanto

# Virtuala Kongreso de Esperanto kalejdoskope





UN 75-jara/Memortago pri Hiroŝimo-Nagasako: Ne plu Hiroŝimon - atesto de atombombito




Koncerto: Perla Mielo




UN 75-jara/Memortago pri Hiroŝimo-Nagasako: Pri Hiroshima kaj Nagasaki




Libroj de la Jaro: Eldonejo MAS





Postpandemia epoko: perspektivoj




Libroj de la Jaro: Eldonejo Espero




Aŭtora Momento kun Sten Johansson




Aŭtora Momento kun Trevor Steele